

KER-sesio – 9a Tutmonda Ekzamentago – 28a de novembro 2020

Salutmesaĝo por la partoprenantoj

Estimataj kandidatoj,

En la nomo de la ekzamenkomisiono de UEA kaj Lingvoekzamena Centro Origó en Hungario, mi kore salutas vin okaze de la 9a Tutmonda ekzamentago.

En la tuta mondo ni havas jam pli ol 2400 sukcesintojn, el 75 landoj. Hodiaŭ okazas sesio en 12 lokoj de 9 landoj: en Azio, Eŭropo, Ameriko kaj unuan fojon en Afriko! Ĝojigas nin, ke malgraŭ la pandemio ni sukcesis organizi tiun eventon. Gratulojn kaj dankon al vi!

Bonvolu nun fari grandan aplaŭdon al viaj lokaj organizantoj, sen kies valora helpo la sesioj ne povus okazi.

Antaŭ ol vi komencos la laboron jen kelkaj informoj pri la farendajoj:

- Unue bonvolu malŝalti komplete vian poŝtelefonon kaj viajn aliajn elektronikajn aparatojn.
- Krom la vortaro kaj skribiloj, trinkaĵo, manĝaĵoj kaj naztuko nenio alia rajtas resti sur via skribotablo.
- Post kelkaj minutoj vi ricevos viajn taskojn.
- Unue vi devos kune kun la gvidantoj **plenigi la frontpaĝon** de testoj.
- Bonvolu **nenien skribi vian propran nomon** sur la foliojn, vi **uzu nur vian ekzamenkodon**.
- Ni petas vin **atenteme legi ĉiujn taskojn**, labori bele kaj legeble, laŭ viaj plej bonaj konoj kaj respektante ĉiujn regulojn de la ekzameno.
- **Atentu labori pri ĉiu unuopa tasko**, ĉar ne sufiĉas atingi la suman minimumon. Necesas, ke en la respondoj pri ambaŭ tekstoj vi atingu la unuopan minimum-poenton. Do, tiel **pro ununura nefarita tasko**, eĉ se la alian vi solvis perfekte, **vi povus fiaski**.
- Tamen sciu, ke **ne necesas scii ĉion por sukcesi**.
- Se vi faris **eraron, korektu** ĝin tiel, ke por la korektontoj estu klare, kiu estas fine la bona respondo.
- Vi rajtas **skribi nur per neforviŝebla blua aŭ nigra inka skribilo**, sed vi rajtas fari malnetaĵojn sur la du blankaj folioj, kiujn la gvidantoj donos al vi. Tiujn vi devos redoni fine de la ekzameno.
- Dum la ekzameno estas permesate **uzi nur UNULINGVAN, PAPERAN** vortaron. Neniun alian helpilon vi rajtas uzi.
- **Dum la skriba ekzamenparto** pri la paso de la tempo niaj kolegoj regule atentigos vin.
- Dum tiu parto **eblas konsumi etajn manĝaĵojn kaj trinki**, sed bonvolu neniel ĝeni viajn najbarojn.
- Se necesas, **eblas eliri el la ĉambro por higieniaj paŭzoj**, sed nur unuope, sen folioj kaj por mallonga tempo.
- **Dum la laboratoria parto ne estas permesate eliri el la klasĉambro, nek manĝi**.
- Fininte kaj kontrolinte vian laboraĵon vi transdonu ĝin al la respondeculo, kaj silente forlasu la ĉambron.
- Bonvolu konscii, ke nur post ĉ. du monatoj vi estos rete informita pri la rezultoj. Pri la sendado de la atestiloj ni aparte zorgos kun la organizantoj.

Se vi havas demandojn, bonvolu nun starigi ilin al niaj lokaj kolegoj.

Mi mem en la nederlanda urbo, Hago atendas la unuajn raportojn kaj fotojn.

Por la ekzameno mi elkore deziras al vi multe da sukceso.

Amike, Katalin Kovats (Kovaaĉ), organizanto de la KER-ekzamenoj, en novembro 2020.